

Johann Wolfgang von Goethe,
Al la forulino

tradukita de Lorenz Urbano

Ĉu perdis mi vin, belulino?
Ĉu via fuĝo — mia sort'?'
Ankoraŭ sonas laŭ rutino
En la oreloj ĉiu vort'.

Kaj kiel al ĉiel' matene
Rigardas vane la migrant',
Se alte tra l' aer' serene
Eksonas la alaŭda kant':

Mi same ĉien en la landoj
Rigardas ofte kun pasi';
Vin vokas ĉiuj miaj kantoj:
Revenu, amatin', al mi!

*Traduko de la Germana poemo "An die Entfernte" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LORENZ URBANO (civila nomo: Heinrich Lorenz, *1902 – †1980).*

MR-518-1a / Arg-845-1703 (2013-02-27 10:35:38)

Pri la tradukinto vidu la retejon . Lia civila nomo estis "Heinrich Lorenz", li vivis de 1902 ĝis 1980.

Johann Wolfgang von Goethe,
An die Entfernte

So hab ich wirklich dich verloren?
Bist du, o Schöne, mir entflohn?
Noch klingt in den gewohnten Ohren
Ein jedes Wort, ein jeder Ton.

So wie des Wandrers Blick am Morgen
Vergebens in die Lüfte dringt,
Wenn, in dem blauen Raum verborgen,
Hoch über ihm die Lerche singt:

So dringet ängstlich hin und wieder
Durch Feld und Busch und Wald mein Blick.
Dich rufen alle meine Lieder;
O komm', Geliebte, mir zurück!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-845-1702 (2013-02-27 10:58:06)

Vidu ankaŭ: <http://www.textlog.de/18384.html> kaj <http://www.kalliope.org/en/digt.pl?longdid=goethe2000082803>.